




1-A JARKOLEKTO

julio/
agosto
1989

NCz\$ 1,00

ABC

en la Internacia Lingvo Esperanto



saluton!




"DANK'AL la irado de la bov-ĉaro, la kukurboj sin akomadas" diras ĝauca popol-diro. Tio validas ankaŭ por ABC, kiu ankoraŭ serĉas sian propran vojon laŭ redakt-linio. Sed ŝajnas, ke io jam definitivas: ĝi estu socikultura revueto kun emfazo al la E-movado. Ni bezonas tiajn publikigaĵojn precipe en lando en kiu antaŭkelktempe nur LA LAMPIRO, de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, ludis tiun rolon.*** Por ke ABC estu multobligita per ofseto ni bezonas mendon de minimuma 100 ekzempleroj. Malgraŭ la fakto, ke grandparte de ĉi u eldono estas sendita al ESPA-anoj, abonantoj kaj al konsiderinda nombro de asocioj naci-skale, nepre necesas ankaŭ, ke ni pligrandigu la unuopajn vendojn por ne havi malprofiton. Tiucele ni kalkulas je la helpo de niaj estimataj legantoj: varbu novajn abonantojn, helpu nin disvendi ĝin unuope. Se paroli pri tio, nian koran dankon al vi kiu jam ekfaras tion! Plaĉan legon al ĉiuj. LA ESTRARO

ZERO HORA



PIONIRA TEMPO



EL "ORA LIBRO DE LA ESPERANTO-
MOVADO: 1887-1937". Teksto de
G. Waringhien

HISTORIA SKIZO DE LA ESPERANTO-MOVADO

La Esperanta movado estas, samtempe kaj kune idea, socia kaj lingva movado, kaj devus esti studata laŭ tiuj tri aspektoj: tio klarigas la malfacilaĵojn de tia studo, kiu ĝis nun estis nur skizita.¹⁾ En la sekvantaj kelkaj paĝoj ni kompreneble neniel pretendas al kompleteco: nur la ĝeneralaĵajn trajtojn ni povos ĉi tie desegni, proven de alia pli ampleksa verko.

La historio de la Esperanta movado komencigas la 14. de Julio 1887²⁾ kun la publikigo de la *Unua Libro por Rusoj*. Sed ĉar la aŭtoro de la lingvo multe influis ties postan malvolviĝon, ne estas superflue serĉi la motivojn de lia entrepreno. En parto de la Ietero al Michaux, kiun mi publikigis en Enciklopedio (sed ĝuste tiun parton politikaj skrupuloj igis prisilenti), Zamenhof skribas: »Mi de la plej frua infaneco fordonis min tute al unu ĉefa ideo kaj revo — al la revo pri la unuigo de la homaro. Tiu ĉi ideo estas la esenco kaj celo de mia tuta vivo, la afero Esperanta estas nur parto de tiu ĉi ideo — pri la tuta cetera parto mi ne ĉesas pensi kaj revii; kaj pli malpli frue (eble tre baldaŭ), kiam Esperanto jam ne bezonos min, mi elpaŝos kun unu plano, por kiu mi jam delonge preparigas... Tiu ĉi plano (kiun mi nomas »Hilelismo«) konsistas en la

kreado de morala ponto, per kiu povus unuigi frate ĉiuj popoloj kaj religioj...« Kaj li precizigas, ke se li ne estus »hebreo el la ghetto«, la ideo pri la unuigo de la homaro aŭ tute ne venus al li en la kapon, aŭ ĝi neniam tenus lin tiel obstine en la daŭro de lia tuta vivo. Tiuj rimarkoj jetas lumon ne nur sur la animstaton de Zamenhof en la momento, kiam li »transiris la Rubikonon«, sed klarigas multajn detalojn en la posta malvolviĝo de la afero.

Tamen ni devas konstati, ke en la komenco li zorge kaŝis tiujn profundajn intencojn, kaj prezentis al la publiko sian verkon sur la intelekta ebena, kiel simple praktikan ilon de interkomprenigado. Kaj la lanĉadon de la libreto li organizis en la plej realista spirito.


Li trovis aŭskultadon ĉe du specoj de publikoj, kiuj estis jam preparitaj ricevi tian mesaĝon: unue ĉe tiuj, kiuj jam okupiĝis pri la ideo de mondlingvo okaze de Volapük; due ĉe la pli kleraj amoj de tiu juda popolo, »kies tuta historia misio (laŭ vortoj de Zamenhof mem) konsistas en la unuigo de la nacioj por la celado al *unu Dio*, t. e. unuj ideoj por la tuta homaro«. Precipe la mondlingvanoj helpis al lia entrepreno; oni povus diri, ke, same kiel la kristanismo elkreskis el la hebreaj sinagogoj, tiel Esperanto enplantiĝis en la volapükistajn randojn kaj tie ekfloris. Sufiĉos citi la nomojn de Grabowski, de Wahl, Trompeter, Einstein, Nylén ktp., kiuj venis de Volapük al Esperanto por tion konfirmi. Al flankoj judoj estis ne malmultaj en la vicoj de la unuaj esperantistoj, ĉar Zamenhof, kiu, kelkatempe, estis vigla cionisto, konservis inter ili daŭrajn amikajn rilatojn.

Al tiuj du grupoj da adeptoj aliĝis iom poste, en Rusujo, certa nombro da tolstoĵanoj, kiuj esperis uzi Esperanton kiel propagandilon por siaj kredoj; sed ilia agado estis baldaŭ malhelpata de la cara cenzuro.

Jen la unua kerno, el kiu elvolviĝis la nun jam potenca movado: ne profitamaj, idealistaj homoj, kapablaj je grandaj oferoj por siaj ideoj, sed disponantaj malmulte da materialaj rimedoj. Tamen tiun idealismon oni ne devas tro akcenti, kiel faris Privat kaj Drezon, kaj kontrastigi kun la materialismo de la tiel nomata »franca epoko«. Sendube, tiuj unuaj esp-istoj

• Soveta Unio. En Kaunas (Litovio) troviĝas ĉi tiu domo, kies posedanto estis la familio de Klara Zilbernik, edzino de d-ro L. L. Zamenhof. Li ĉi tie konatiĝis kun sia estonta edzino, ofte gastis kaj dum tiu periodo eĉ loĝis. Pro tio la strato en kiu la domo troviĝas (fotita antaŭ la rekonstruo) portas la nomon de Zamenhof.

esperanto 1981 decembro



konsciis, ke ili laboras por la bono de la homaro; sed tiun honon ili vidis precipe en la intelekta sfero, en plifaciligado de la internaciaj rilatoj, en progreso de la scienco kaj kulturo ktp. La poemo »En la mondon venis...«, kun sia religia kaj pacifisma atmosfero, vekis tre malmulte da ejoj en la tiutempa literaturo, se juĝi laŭ la enhavo de »La Esperantisto« kaj »Lingvo Internacia«. Teksto, kiel la letero de Tolstoj (»la lernado de E. kaj la vastigado de ĝi estas sendube kristana afero, kiu helpas al la kreado de la Regno de Dio...«) estas unikajo en la jarkolektoj de tiuj du gazetoj. Nur en la sekvanta periodo ekfloros tiu specifa mistiko.

Tiu unua periodo, kiun la historiistoj de E. kutime kalkulas ĝis 1900, estis do pli ĝuste tempo de provado: oni esploris la lingvon el kritika vidpunkto, diskutis la diversajn reformprojektojn (inter ili tiun prezentitan de Zamenhof mem), kaj post longa batalado, decidis konservi (krom la sola ŝanĝo de la serio *iam, tian, kian* ktp. en *iam, tiam, kiam* ktp.) la lingvon tia, kia ĝin publikigis la aŭtoro. Jen la ĉefa fakto de tiu periodo: la prudento kaj saĝo de tiuj unuaj esperantistoj, eble influataj de la katastrofa ekzemplo de la senĉesaj plibonigoj de Volapük,

ebligis kvietan kaj seninterrompan disvolviĝon de la movado sur de tiam definitiva fundamento. Tuj post tiu krizo, oni ekvidas en la gazeto »Lingvo Internacia« aperu kaj graviĝi la tri temojn, kiuj altiras la atenton de la samideanoj: la propagando (planoj pri sistema atako de la nacilingvaj ĵurnaloj, pri kuragiĝo al la »vastigantoj« ktp); la lingvistado (rimarkoj pri la uzado de la prepozicioj, de la vortfarado ktp); la literaturo (traduko de *La Neĝa Blovado* fare de Grabowski, de *Demono* fare de Devjatnin, de *Kain* fare de Kofman, de *Hamlet* fare de Zamenhof mem). Pri tiu lasta temo jam esprimiĝas la opinio, ke ĝi ludas en movado kiel la nia netroigeblan rolon: »... entrepreno, kiu fortikiĝos la tutan estontecon de nia afero kaj, donante al ĝi la eblon regule kaj senhalte kreskadi, liberigos ĝin fine por eterne de ĉiaj mortigaj disputoj kaj ŝanceliĝoj«, skribas Zamenhof pri sia »Biblioteko«. Tiu zorgon li ne forlasos ĝis sia lasta tago.

PLUAS VENONTNUMERE



Esperanto-Societo de P. Alegre

Propra sidejo: Andradas, 1137/1704 BR-90020 Porto Alegre RS, Brazilo. Poŝt-kesto 1415. Fondita je 2/4/1945. Rekonata kiel havanta publikan utilecon laŭ municipa leĝo n-ro 483 de 13/11/1950. Estrar-periodo 89/91!

Prezidanto: Ernani Borges

Vic-prezidantino: Zélia da Silva Zaghetto

1-a sekretario: Cleonice de Lima

2-a sekretario: Solon Sant'Anna

Kasisto: Wenceslau Gonçalves

Bibliotekisto k ABC-Redaktoro: Cesar D. Soares

ABC ĉirkaŭas ĉiudumonte naci-skale. Abonotizo: 3 nume - roj kontraŭ Nkr. 3,00, 5 numeroj kontraŭ Nkr. 5,00. Pagu per ĉeko nome de la prezidanto au kasisto. Oni petas in - tersaĝon. Ĉiu kunlaboraĵo estas bonvena!

"LA IDEALISTOJ ESTAS LA REALISTOJ DE LA BONO."

iom da paco



Ja kiel floron ĉe l' vintra komenc'
 Kaj fajron en venta, glacia potenc'
 Kaj kiel pupon ŝatatan ne pli,
 Min tre ofte sentas mi.
 Kaj tiam mi vidas la nubojn sur Ĉiel',
 Mi aŭdas la birdojn flugantajn sen cel',
 Mi kantas en tim' pro obskura minac',
 Esperas, ke estu pac'.
 Iom da paco, iom da suno
 Por' nia tero, por nia' nuno.
 Iom da paco, iom da ĝojo,
 Iom da varmo mi petas por ni.
 Iom da paco kaj da revado
 Kaj por la homoj ne plu plorado.
 Iom da paco, iom da amo,
 Estu l' espero ne iluzi'!!
 Ne pro miaj kantoj ŝanĝigas event',
 Mi estas knabin' nur kantanta laŭ sent',
 senhelpa, soleca, birdet' sen potenc'
 Kun tim' pro la storm-komenc'.
 Iom da paco...
 Kantu forte nun kun mi,
 Pac' ne estu utopi'!!

B. MEININGER

INTERVJUI

PROF. GERALDO MATTOS, MEMBRO DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO KAJ DE PEA-PARANÁ ESPERANTO-ASOCIO, ESTAS LA INTERVJUITO DE ĈI TIU NUMERO DE "ABC":

A B C - KIAM KAJ KIAL VI INTERESIĜIS PRI ESPERANTO?

GERALDO MATTOS - Unufoje, en 1947, mi eniris en la bibliotekon de la Franciskana Seminario en Rio-Negro, ŝtato Paranao, kaj mia ordinara kutimo portis min al la simpla rigardado de libroj. Kaj min atentigis malnova volumeto: Esperanto - Die Sprache der Welt (mia memoro ne estas mem oro, kaj la titolo povas estinti alia...). Mi ĝin foliumis: la germanan mi tiam ne mastris, kaj eĉ ne nun... kaj la alia lingvo havis kelke da vortoj evidente latinaj (latino estis tiam mia ruino, kaj nun mi estas profesoro pri ĝi en mia universitato: ironia evoluo de la iro nia en la vivo!). Unu bonvola germandevena seminariano tradukis por mi la tutan libron, mi eklernis iom hezite, kaj komeŝis mian Esperantistan vivon. Tio estis la kiamo de mia esperantisteco. La dua parto de la demando estas pli grava, sed ĝis nun mi neniam trovis



Akademiano Prof-ro D-ro Geraldo Mattos
antaŭ siaj gelearnantoj, en Esperanto-Asocio de
Brasília.
Fotis: R. Resende.

taŭgan respondon por la kialo de mia esperantisteco, krom la fakto, ke ekde la unua momento mi ekamis la lingvon kaj la tiam por mi nehaveblajn ĝiajn lingvanojn: ĉu estas necesi klarigi la motivojn de amo?...

A B C - KIAN TAKSON VI HAVAS PRI LA NUNTEMPA ESPERANTO-MOVADO EN BRAZILO?

GERALDO MATTOS - Geamanto estas duonokula: mi vidas nur ĝian bonan flankon. La precipa motivo por mia ĝojo estas tio, ke multaj brazilanoj amas la lingvon, kaj batalas por ĝi.

A B C - ĈU EVENTUALE DISDIALEKTIĜO DE ESPERANTO ESTAS EBLA EN LA ESTONTECO?

GERALDO MATTOS - La estonteco havas ĉian eblecon, eĉ tian. Tamen, la naturaj lingvoj donas al ni la ekzemplon de tio, ke ĉiam stariĝas komuna lingvo kun komuna normo, komune akceptita de la elito, kaj ĉiam garantiata per la forto de la Edukado kaj de la Informado. Krome, Esperanto estos por

longa tempo okaza lingvo, kaj eble por eterne, ordinare pli skriba, ol parola: la disdialektiĝo estas ebla, sed ne verŝajna.

A B C - KIUJN SUGESTOJN VI HAVAS POR NIA 5a SUSBRAZILA RENKONTIĜO?

GERALDO MATTOS - Akceptu nin kun amo! De ĉio rezultos la perfekteco de la Renkontiĝo, ĉar ĉiu sin trovos hejme.

A B C - KIUJ ESTAS LA ĈEFAJ ANTAŬKONDIĈOJ POR LA SUKCESO DE LA REKTA METODO?

GERALDO MATTOS - Mi estas antaŭ ĉio mistika pri Esperanto: ne ni ĝin elektas, sed ĝi nin elektas. La elektita progresas spite de la instruisto kaj de lia metodo. Evidente, bona instruisto kun bona metodo ĉion akcelas. Se


mi devus diri kelkajn antaŭkondiĉojn, mi citus jenajn:

- a) La instruisto devas perfekte paroli la lingvon.
- b) Li devas bone sciigi pri la interferoj de la portugala lingvo por ilin antaŭeviti.
- c) Pli bone estas uzi nur Esperanton en la lecionoj.

ĈE

espa

VI UZAS LA LINGVON



HUMORE

JEN KELKAJ HUMURAJ FRAZOJ DE LA GENIA SÉRGIO "ARAPUÃ" DE ANDRADE, BRAZILA JURNALISTO KAJ REKLAMISTO, LA KREINTO DE BOKO MOKO (1970):


- * Se ne estus la 1-a de Majo, la plejmulto el niaj parlamentanoj pasigus la tutan jaron ne havante iun tagon de laboro.
- * Estas tiom ega la malfido ĉi-lande, ke kiam vi asertas, ke ia ulo estas honesta, aliulo tuj demandas:
- Kaj kiom li estas gajnanta per tio?
- * Se tiutempe estus polico, ĝis hodiaŭ ni ne scius kiu mortigis Abelon.
- * Kontrabando en Brazilo estas iu negoco kiun oni scias tra kie eniras, scias kiel eniras, scias kien iras, scias kiu alportas, scias al kiu iras, scias kiu aĉetas, scias kiu vendas, scias kiuj estas la ĉefoj. Malfeliĉe estas tre malfacile kontraŭbatali ĝin ĉar mankas pli bonaj informoj.
- * La polic-aŭtoj preterpasas nin en tiu damnita rapideco pro iu kialo tre simpla: ili ĉiam malfruas.
- * Mi trovas tre ridindaj kelkajn edzojn kiuj portas antaŭtukon kaj rompas la teleraron antaŭ la kuir-lavujo dum la lavado: mi neniam rompis ion ajn. (tradukis C.D.S)



Ja!

LA FRANCA REVOLUCIO LAŬ MARKSO

LAŬ Markso la Franca Revolucio estas la klasika ekzemplo de burĝa revolucio, de ĝia ascendo al la kondiĉo kiel su perregantan klason. Ĝi signalas semtempe ĝian transiron al la kondiĉo de klaso interesata pri la protektado de la ordo, firme kontraŭstarante ekde tiam ĝiajn interesojn al tiuj de la universalaj rajtoj. Tiu transiro estis sufiĉe markita en la historio de la Franca Revolucio. Se en 1789 la Homaj Rajtoj estis konsideritaj nur la politikajn rajtojn, ekde 1792 ili ĉirkaŭbrakas ankaŭ la socian problemon. En la konstitucio de 1793 oni agnoskas la rajton je la laboro, je la viv-rimedo, je iu socia asistado. Videblas iu radikaligo de la teorio pri la Natura Rajto kiu ekkontestas la netuŝeblan karakteron de la rajto pri propraĵo. En 1793 la propraĵo estas difinita kiel institucion kaj ne plu kiel naturan rajton. Sed ekde 1794 dank'al la t.n. "Termidor", la Revolucio suferas retroiron, alkonformigante kun la limoj truditaj de la burĝeco. Hodiaŭ post ducent jaroj de la Franca Revolucio, la granda devizo pri "Libereco, Egaleco kaj Frateco" estas ankoraŭ defio por la homaro. (el la gazeto "EM TEMPO"/majo '89)



NI SEMAS

5a SUDBRAZILA RENKONTIĜO DE ESPERANTO

GEA antaŭnelonge ricevis oficialan leteron pere de kiu ESPERANTO-ASOCIO DE SANTA CATARINA manifestiĝas favore al la realigo de la 5a SBRE en Santa Maria, RS, de la 7a ĝis 9a de oktobro: "La Esperanto-Asocio de Santa Catarina (EASC) tute konsentas pri tiu evento, kaj certe niaj anoj partoprenos en la Renkontiĝo, kiu sendube estos signifoplena por la MOVADO."

KULTUR-KUNVENO

La 12an de aŭgusto, sabato, je la 4h30 ptm okazos la unua KULTUR-KUNVENO, ĉe ESPA. La ideo estas la jeno: ĉiun duan sabaton en la monato oni starigu diskutadon pri iu antaŭelektita temo de la aktualeco. En aŭgusto la temo estos "ELEKTOJ '89: ESPERO EN LA KRIZO". Meze de la politika, ekonomia kaj soci-morala krizo kiujn Nacio frontas, la Elektaj '89 signifas momenton pri es- pero. Sed ĝiskiagrade? Ĉu la proponitaj kandidatecoj vere kongruas kun la aspiroj kaj esperoj de la elekto- toj? Venu debati kun ni pri tiuj gravaj demandoj!

20/8: TEOTRINKADO ĈE "ESPA"

La 20an de aŭgusto, dimanĉe, je la 4h ptm, ĉe ESPA, okazos la unua KUNFRATIGA TAGO, al kiu ĉiu ESPA-ano estas invitata. Dum teotrinkado la novaj asocioj havos la oportunon koni nian sidejon kaj bibliotekon samkiel interŝanĝi ideojn pri ESPA-aktivado.



lingve

JEN KELKAJ KURIOZAJĜOJ ELPRENITAJ EL LA LIBRO "AS LINGUAS DO MUNDO", LEGINDA VERKO DE CHARLES BERLITZ (ELDONEJO " NOVA FRONTEIRA", 316 p.):

LA ŜTONO DE PARAÍBA *****
 La ŝtono de Paraíba, kun skribaĝo en la fenica, estis trovita en 1872 kaj preparolas pri ekspedicio de 10 ŝipoj el Sidon, en Fenicio, al vojaĝo laŭ la afrika marbordo. Parto de la skribaĝo diras la jeno: "Ni venas el Sidon (...). La komerco irigis nin al tiuj distancaj plaĝoj, iu montara tero."

NEKOMPRENAĜOJ *****

Antaŭ io malfacile komprenebla la lingvoj diras:

- | | |
|----------|--------------------------------|
| angla: | "Tio estas la greka por mi." |
| hispana: | "Tio estas la ĉina por mi." |
| germana: | "Tio ŝajnas al mi la hispana." |
| rusa: | "Tio estas ĉina gramatiko." |
| itala: | "Vi parolas la turkan!" |
| franca: | "Tio estas la hebrea por mi." |

ZEBRONJ *****

Blankuloj ĝenerale konsideras la zebron kiel iun blankan beston kun nigraj strioj; afrikaj indiĝenoj konsideras ĝin la kontraŭon: nigran beston kun blankaj strioj...

CIAO! *****

La itala "ciao!", portugallingve "tchau!", devenas el la vorto "schiavo" ("sklavo") kaj origine signifis "mi estas via sklavo".

ĈU "S" AŬ "Ĉ"? *****

Neniu scias kiel la romianoj elparolis la "c" - kiel la esperanta "s" aŭ "ĉ"?

SKRIB-SISTEMOJ *****

Sube mirinda silmilleco inter du skrib-sistemoj nedaĉifre -
blaj: unu estis trovita en la Insulo de la Pasko; alia, en
la valo de Hindo, en Pakistano!



JAPANAJ SEMAJNTAGOJ *****

En la japana la semajntagoj omagas al la suno, luno, fajro,
akvo, ligno, argento kaj kupro.



Korespondaĵoj


EL MOSKVO

"En la 54-a numero de "KOMUNIKOJ" aperis malgranda informo,
ke vi eldonas bultenon ABC, kaj deziras kunlaboraĵojn. La de-
mando estas, ĉu eblas ricevi iamaniere vian bultenon." (An-
dreo Orlov)

5a SUDBRAZILA RENKONTIĜO DE ESPERANTO
5a SUDBRAZILA RENKONTIĜO DE ESPERANTO
5a SUDBRAZILA RENKONTIĜO DE ESPERANTO

7-9/10/89 SANTA MARIA, RS

Je 80 km for de Santa Maria,
RS, ejo de la 5a SUDBRAZILA
RENKONTIĜO DE ESPERANTO,
oktobron, situas
la urbeto MATA,
turisma atrakcio
internacie konata
pro ĝia riĉega
fosiliigita
materialo
konstituita de
arboj kiuj vivis
antaŭ milionoj da
jaroj kaj hodiaŭe
estas ŝtonoj.



RS
per fotoj